

Emanuel Geibel,
Migrado

tradukita de Ludwig Emil Meier

1. Nun Majo alvenis,
Burĝonas la arbar',
Do restu en hejmo,
Filistra homar'!
La nuboj ĉe ĉielo
Migradas jam for,
Laŭ ili nun fortiras
Min la migrama kor'.

2. Nu, patro, patrino,
Adiaŭ nun al vi,
Feliĉon ekstere
Serĉadas nun mi,
Ja, multe da vojoj
Ne vidis mi jam
Kaj multe da bonvino
Nur konas mi laŭ fam'.

3. Antaŭen, antaŭen
Dum hela sunradi',
Trans montoj, trans valoj
Kun vigla energi'!
La fontoj murmuris,
Bruigas arbojn vent',
La koro kun alaŭdo
Kunkantas pro kontent'.

4. Vespere en urbeto
Gastigos min trinkej':
"Ho, mastro, nur vinon,
Sed de bongusta plej!"
"Ekprenu gitaron,
Gajega muzikant'!"
"Prikantos mi knabinon,
De kiu mi amant'."

...

5. Se mankos restejo
 Kun noktripoz' kaj vin',
 Sub ĉielo mi kuŝos,³
 La steloj gardos min,
 Bruanta tilio
 Lulados al dormad',
 La matenruĝo vekos⁴
 Denove al migrad'!

6. Migrado, migrado
 Libera ĝojo vi,
 En brust' freŝe blovas
 La spiro de Di',
 La koro ĝojegas
 Por la ĉirkaŭa rond',
 Ke vi do estas bela,
 Ho, vasta, vasta mond'!

*Traduko de la Germana poemo "Der Mai ist gekommen" de Emanuel Geibel en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (*1847-02-16 – †1919).*

Arg-235-466 (2006-05-07 20:51:04)

Tiun ĉi tradukon mi, Manfred Retzlaff, prenis el la libro "Esperantista Kantaro", Kolekto unua: Germanaj kantoj popolaj kaj studentaj, Esperantigitaj de L. E. Meier, eldonita en 1907 de Hans Theodor Hoffmann, Berlin W. 35, Steglitzer Str. 44.

³Rimarkigo de Manfred Retzlaff: En la "Esperantista Kantaro", el kiu mi la tekston detajpis. la linio tekstis: Sub ĉielo min kuŝos. Sed tio verŝajne estas pres-eraro.

⁴Ŝanĝpropono de Manfred Retzlaff: La matenruĝ' min vekos